BOHEMA ESPERANTISTO

ČESKÝ ESPERANTISTA

Měsíčník pro šíření esperanta a esperantismu mezi Čechy
Orgán „SVAZU ČESKÝCH ESPERANTISTŮ“ v Rakousku.
Zodpovědný redaktor: H. K. BOUŠKA, Praha-Smíchov 1097.
Vydavatel a nakladatel: J. IGLAUER, Praha III., Hroznova 6.
Celoroční předplatné 4 K
pro členy spolků sdružených ve »Svazu čes. esp.« 3 K, jednotlivá čísla 36 h.
Ročník V. — Sešit I.
Praha, 31 X. 1910. Cena 36 h

ČESKÝ ESPERANTISTA Redakce a administrace: **Praha III., Kampa 495, Čechy.** Roční předplatné 4 K. - První česko-esperantská revue přinášející české informační články a zprávy o jazyce mezinárodním a hnutí esperantistickém, esperantské zábavné i poučné, původní i přeložené články o nejvýznačnějších otázkách a událostech kulturních, zvláště mezinárodních, vychází za redakce H. K. Boušky (Praha-Smíchov 1097) a za spolupracovnictví četných čelných esperantistů domácích i cizích, pravidelně 25. dne každého měsíce (12 kráte za rok) v sešitech nejméně o 16. str. Revue jest orgánem »Svazu čes. esp.« (Bohema ASOCIO esperantista, Praha II., Hybernská 1036/XIV), jehož členové dostávají ji **zdarma**, zaplatí-li roční přísp. 5 K, nečlenové za roční předpl. 4 K (pro členy spolků sdruž. ve Svazu je předpl. 3 K.).

BOHEMA ESPERANTISTO Redakcio & administracio: **Praha III., Kampa 495, Bohemujo-Aŭstrio.** Jara abonprezo 1·70 Sm. — La unua monata bohem-esperanta revuo por propagando de esperantismo inter Bohemoj, oficiala organo de »BOHEMA ASOCIO ESPERANTISTA« (Svaz českých esperantistů, Praha II., Hybernská 1036/XIV., Bohemujo-Aŭstrio) eliras sub la redaktado de H. K. Bouška (Praha-Smíchov 1097, Bohemujo-Aŭstrio) kaj kun laborado de multaj eminentaj esperantistoj bohemaj kaj fremdaj regule la 25-an tagon de ĉiu monato (12-foje dum la jaro) en kajeroj almenaŭ 16-paĝaj enhavante krom bohemaj informaj artikoloj multajn esperantajn originalajn kaj tradukitajn, amuzajn kaj klerigajn artikolojn kaj notizojn pri temoj aktualaj kaj internaciaj.

Zásilky pro „Svaz čes. esp.“ adresujte: Mil. Schmidt, Praha-II. 1036/XIV.

Český Esperantista-Bohema Esperantisto. Ročník / Jarkolekto V. Sešit / Kajero 1. Praha 31.X.1910.

Upozornění. Rukopisy, dopisy, knihy a časopisy buďtež posílány redaktoru, předplatné a reklamace administraci. Všechny publikace redakce došlé jsou oznamovány. Netištěné rukopisy se vrací, byla-li přiložena známka na odpověď. Kdo nevrátí ukázkové číslo do 8 dnů, považuje se za odběratele a je povinen zaplatiti aspoň na půl roku; vrácení některého z dalších čísel po ponechání si čísla ukázkového nepovažuje se za výpověď. Členové »Svazu čes. esp.« mají nárok na časopis teprve po zaplacení členského příspěvku. Odběratelem časopisu nebo členem svazu přestává býti jen ten, kdo to písemně oznámil. Reklamace přijímá a vyřizuje administrace jen do vyjití následujícího čísla.

Pořadatele přednášek, kursů, výstav, schůzí, zábav, výletů a pod. podniků českých esperantistů prosíme snažně o laskavé zasílání zpráv (nejlépe na koresp. lístku!), případně i příslušných dokladů (plakáty, pozvánky, oběžníky, výstřižky z časopisů atd.). Majíce vážnou snahu zachytiti co nejúplněji vývoj a stav esperantismu u nás, zaznamenáváme nestranně každý podnik, o němž dostali jsme spolehlivé zprávy, bez ohledu na to, kým je pořádán, zda korporací či jednotlivcem, zda tou či onou stranou. Každý spolek a jednotlivec měl by ve vlastním zájmu dbáti, aby se o jeho činnosti vědělo a zprávy zachovaly.

Důvěrníky „Svazu čes. esp.“ prosíme, aby zásilky určené pro časopis (zejména zprávy o přednáškách, kursech, výstavách, schůzích, zábavách, výletech, dále plakáty, pozvánky, oběžníky, články časopisecké a pod.) zasílali přímo redaktoru »Čes. esp.«. Gen. sekr. Svazu buďtež zasílány jen zprávy důvěrné, neurčené pro veřejnost (především odpovědi na rozesílané dotazníky).

Illustrované přednášky (vydává prof. dr. Alex. Batěk v Plzni-Lochotíně) přinesly v poslední době nové, zajímavé rozpravy, jež svým čtenářům vřele doporučujeme jako výbornou a levnou vzdělávací četbu (seznam všech dosud vyšlých sešitů — přes 250 — zašle administace zdarma). O lišejnících (60 h), O stříbře (24 h), Sedmý zemědíl III (24 h), Strojená barviva (24 h), O vývoji rostlin (60 h), Zužitkování kanálových vod městských (36 h), O choleře (12 h), Z dějin dopravnictví (36 h).

Přehled revue, rozhledy po kulturním životě českém (Vinohrady, Kolárova 19), vychází nyní týdně. Čtvrtletní předplatné této nepostrádatelné revue pouze 3 K.

Esperantská korrespondence — Esperanta korespondado.

Jednonásobné otištění oznámení stojí 60 h., trojnásobné K 1·50. Členové svazu a spolků sdružených platí pouze 40 hal., resp. 1 K. Pro přímé předplatitele je prvé otištění zdarma. — Vyměňovati dopisy[1]), pohlednice[2]), pošt. známky[3]), přejí si:

La unufoja enpreso de l' anonco kostas 25 sd. trifoja 63 sd. La anoj de l' asocio kaj aliĝintaj societoj pagas sole 17 sd, resp. 42 sd. Por la abonintoj la unua enpreso estas senpaga.— Interŝanĝon de leteroj[1]), ill. poŝtkartoj[2]), poŝtmarkoj[3]) deziras:

90. Bohumír Vondráček, notara oficisto, Kamenice n. Lípou, Bohemujo [1]) [2]) [3]). (Kun fraŭlinoj). — 91. S-ro Geo. H. Appleton, Lynchburg, Virginia, U. S. A. Amerik [1]) [2]). Ĉiam tuj respondos. — 92. S-ro R. Schinkel, Mittweida, Saksujo [2]). — 93. S-ro P. I. Sopher, (Hebrea instruisto) 122. South Portland, St. Glasgov, Skotland [2]). — 94. S-ro Gachet, rue Victor-Hugo en Givors (Rhône) Francujo. Kolektas poŝtmarkojn [2] [3]). — 95. F-ino M. Liebing, Leipzig-R (Germanujo), Gemeindestrasse 12. — 96. S-ro John A. Ramstead, R. F. D. 2, Spokane Wash., U. S. A. [2]) [3]). — 97. Sro Stefano Dorsa, Zaszapati, Hungarujo [2]). — 98. Gennadij Uporov, gimnaziano, Irbit, Permskaja gub. [2]). — 99. S-ro W. C. Jansen, Steylaan 64, S. Gravenhage, Holando [2]). — 100. S-ro Hans Sengerot, Bensheim (Hessen, Germanujo pri Ĥemijo) [2]).

ŠESTÁ MEZINÁRODNÍ MANIFESTACE ESPERANTISTŮ.

O šestém mezinárodním sjezdu esperantistů pořádaném ve dnech 15.—20. srpna 1910 ve Washingtonu referuje *Hkb.*

Po šesté již sešli se esperantisté všech dílů světa ke společné mezinárodní manifestaci. Poprvé sešli se mimo Evropu přijavše pozvání usonských samideánů.

Tentokráte sjezd nevynikl ani počtem účastníků, ani počtem národností zastoupených esperantistů, ani konečně významem svého jednání. Je to přirozeno, neboť těžiště hnutí spočívá dosud v Evropě, jádro sjezdového publika tvoří příslušníci Starého světa, a z těch jenom nepatrná část mohla podniknouti nakladnou cestu do severoamerické metropole. Za to na tomto sjezdu bylo oficielně zastoupeno více vlád nežli dosud.

Sjezdu súčastnilo se 357 esperantistů z 35 států Usony (274 účastníků) a 22 států mimousonských (73 učastníci); z Rakousko-Uherska byl účastník jediný, Čech žádný (ač »Unie č. e.« ohlašovala »svého« delegáta).

Oficielními zástupci svých vlád zastoupeno bylo 16 států: Brazilie, Equatorie, Quatemala, Čína, Španělsko, Honduras, Kosta-Rica, Mexiko, Persie, Rusko (ministerstvo obchodu), Uraquay, Usona (ministerstva: vojenství, námořnictví a vnitra), Karolina, Florida, Lousiana, Oregon. Oficielně zastoupen byl také americký národní spolek Červeného kříže.

V e slavnostním zahajovacím sezení (15. srpna dop.), které zahájil (o 10. hod.) kapitán Perogordo, zvoleno bylo předsednictvo (předsedou byl ředitel kanceláře amerických republik a předseda severoamerického sjezdu esperantistů John Barret, ježto ten však churavěl, předsedal ve skutečnosti první místopředseda dr. Yemans), všichni přítomní zástpuci vlád jménem svých států pozdravili sjezd slibujíce, že podají svým vládám příznivou zprávu o sjezdu (první promluvil za Čínu sekretář čínského vyslanectví ve Washingtonu Wu Chang), přečteny byly došlé pozdravné telegramy a přípisy, zaslány pozdravné telegramy presidentu Taftovi, předsedovi stálého výboru sjezdového generálu Sebertovi a předsedovi výboru jazykového rektoru Boiracovi. Na konec ujal se slova Dr. L. L. Zamenhof.

Dr. Zamenhof ve své zahajovací řeči zdraví Usonu (Spojené státy severoamerické) »zemi svobody, zemi budoucnosti«, »zemi, o níž snilo a ještě sní mnoho trpících a mnoho nevinně pronásledovaných«, »říši lidí, která nenáleží tomu neb onomu kmenu neb církvi, ale všem svým počestným synům«, »nejmocnějšího zástupce nového světa«. Ukazuje, že sešli se tu lidé různých kmenů, kteří však přece cítí se jako příslušníci jediného kmene, ježto si jako »samgentanoj« rozumějí »nemusíce jeden druhého pokořovati nebo nutiti, aby koktal v cizím jazyce« a vyslovuje naději, že »dříve nebo později veškerý svět bude podobati se nám a stane se jedním lidským kmenem sestávajícím z různých lidí uvnitř sice různých jazyků a mravů, ale zevně téhož jazyka a týchž mravů.« Připomíná, že jen málokteří esperantisté mohli přijíti do Ameriky, neboť esperantisté nejsou lidé bohatí, že tedy od tohoto sjezdu nemožno čekati závažná usnesení, že esperantisté přišli jen ukázati Americe život esperantského světa, vnésti sem símě, které by klíčilo a rostlo. Chce zde, v zemi, »kde naše věc je ještě příliš mladá«, kde »mnozí ještě nevypracovali si zcela jasný pojem o ní«, aspoň poněkud vyšetřiti cestu, po níž jdeme. Ve svých dřívějších řečích ukázal, co chce hnutí esperantistické, proč je ho třeba, co od něho očekáváme, proč chceme jeho neutralitu, proč proň pracujeme, jaký je duch nás poutající, v dnešní řeči chce rozebrati otázku, »zdaž stojíme s naší prací na cestě zcela jisté nebo zda se musíme obávati, že někdy naše práce ukáže se marnou.« »Cíl, pro nějž pracujeme, může býti dosažen dvěma cestami; buď prací soukromých lidí t. j. lidových mas, nebo dekretem vlád. Nejpravděpodobněji naše věc bude dosažena cestou prvou, poněvadž takové věci, jako je naše, skýtají vlády svoje schválení a svoji pomoc teprve, když vše je zcela hotovo«. Prvá cesta může a musí vésti k cíli, jestliže všichni pracují jednomyslně. Jde však o to, co by se stalo, kdyby řešení otázky jazyka mezinárodního ujala se moc silnější nežli my, vlády, zda ty by nepřijaly jiného řešení. Tuto otázku podrobně rozebral v jednom svém pojednání, které je známo z »Fundamenta krestomatio«,*) a ukázal zcela jasně, že, kdyby vlády zvolily nějaký výbor, který by měl rozhodnouti otázku jazyka mezinárodního, pak by tato autorita nemohla zvoliti ani nějaký jazyk živý ani mrtvý ani umělý

*) »Esenco kaj estonteco de la lingvo internacia« (Podstata a budoucnost jazyka mezinárodního); český překlad vydal »Svaz českých esp.« v »Knihovně čes. esp.« pod názvem »Úvahy o jazyce mezinárodním« (cena 80 hal.)

jazyk s úplně vymyšleným slovníkem, ale »buď esperanto v jeho nynější podobě nebo esperanto poněkud změněné« a že, kdyby tato autorita proti všem požadavkům rozumu chtěla učiniti jiné rozhodnutí, »její rozhodnutí zůstalo by jen papírovým a prakticky naprosto bezcenným«. Pravděpodobně takový autoritativní výbor řekne: »Je tu umělý jazyk, který se ukázal schopný života, výborně se osvědčuje, výborně se již několik let udržuje, vytvořil velikou literaturu, vypracoval svého ducha a život atd.; tedy, místo abychom dělali zcela nepotřebné a bezúčelné riskantní pokusy, příjměme jednoduše to, co tu je, dejme tomu autoritavní podporu vlád, které zastupujeme, a tu celá ta večná otázka bude ihned rozřešena a od zítřka veškeré vzdělané lidstvo si navzájem porozumí.« To je nejpřirozenější rozhodnutí, jež lze čekati. Předpokládáme-li však, že takový výbor by shledal, že v esperantu jsou nutny změny, pak by tento výbor musil uvážiti, zda je dosti silen, aby vnutil svoji theoretickou vůli těm mnoha tisícům, kteří jsou dosud jedinými pracovníky v té věci. »Esperantisté pracovali po dlouhou řadu let, pracovali mnoho, obětovali mnoho a s ohromnou obtíží konečně dosáhli, co se po tisíciletí zdálo nedosažitelno, a co jednou ztraceno, nikdy by se nenabylo, poněvadž svět ztratil by veškerou důvěru v myšlenku jazyka mezinárodního«. Výbor vědomý si své zodpovědnosti nanejvýš by vyslovil svůj náhled o změnách a provedení jich ponechal by esperantistům samotným, kteří jazyk skutečně znají. A kdyby i takový výbor se rozhodl, provésti sám změny v esperantu, pak by jistě uvážil, že »v jazyce, který prožil mnoho let, změniti velké množství slov z pouhého vrtochu, z nějakého čistě theoretického a prakticky bezcenného důvodu bylo by nesmyslem«, »změnil by jen ony tvary a ta slova, která se ukázala špatnými sama sebou, špatnými naprosto, vážně nepohodlnými pro ty, kdož jazyka užívají.« Ukazuje, že obrovská většina kritik esperanta jsou osobní vrtochy, že počet navržených změn prakticky cenných je nepatrný a že i mezi těmi zlepšení je jen zdánlivé; na př. nejvíce se kritisují háčky, aby tiskaři neměli výloh, jako výlupek vší špatnosti je posuzována koncovka množného čísla (j), ač nikdo se neodváží odsuzovati ji v krásném jazyce řeckém atp. »Jedním slovem každý z vás může se přesvědčiti, že jestliže někdy nějaký výbor stanovený vládami bude rozhodovati o změnách v esperantu a jestliže tento výbor provede svůj úkol vážně, bude moci změniti v esperantu jen velice málo«. »To není nějaké přání, ale to nám plně zajišťuje pouhá

logika a rozum, proti nimž žádný výbor nebude hřešiti, nebude-li chtíti, aby jeho práce zůstaly naprosto bez nějakého výsledku.« »Esperantské kořeny stromu jazyka mezinárodního již tak hluboko pronikly do země života, že nemůže již každý, kdo by chtěl, vyměniti kořeny a přesaditi strom dle svého uzdání«. »Můžeme tedy pracovati klidně; nermuťme se, jestliže naše práce někdy je velice obtížná a nevděčná; na naší straně je nejen oheň našich citů, ale na naší straně jsou také nepopíratelné zákony logiky a rozumu. Trpělivě sijme a sijme, aby kdysi naši vnuci měli požehnanou žeň«.

Že řeč ta byla přijata s bouřlivou pochvalou, netřeba zajisté připomínati. Když utichly nadšené ovace, byla schůze zapěním hymny »Espero« skončena. (Dokončení.)

NEŬTRALECO DE ESPERANTO.

Verkis *Dr. Stan Kamaryt.*

En la malferma parolado de la dua kongreso esperantista, de tiu kongreso, kiu akceptis »Deklaracion pri la neŭtraleco de la kongresoj de esperanto« diris dro Zamenhof: »Oni scias, ke ne la rusa gento estas kulpa en la besta buĉado en Bielovstok kaj multaj aliaj urboj; ĉar la rusa gento neniam estis kruela kaj sangavida; oni scias, ke ne la Tataroj kaj Armenoj estas kulpaj en la konstanta buĉado, ĉar ambaŭ gentoj estas trankvilaj, ne deziras altrudi al iu sian regadon, kaj la sola, kion ili deziras, estas nur, ke oni lasu ilin trankvile vivi. Oni scias nun klare, ke kulpa estas aro de abomenindaj krimuloj, kiuj per diversaj kaj plej malnoblaj rimedoj, per amase dismetataj mensogoj kaj kalumnioj arte kreas teruran malamon inter unuj gentoj kaj aliaj. Sed ĉu la plej grandaj mensogoj kaj kalumnioj povus doni tiajn terurajn fruktojn, se la gentoj sin reciproke bone konus, se inter ili ne starus altaj kaj dikaj muroj, kiuj malpermesas al ili libere interkomunikiĝadi inter si kaj vidi, ke la membroj de aliaj gentoj estas tute tiaj samaj homoj, kiel la membroj de nia gento, ke ilia literaturo ne predikas iajn terurajn krimojn, sed havas tiun saman etikon kaj tiujn samajn idealojn kiel la nia! Rompu, rompu la murojn inter la popoloj, donu al ili la eblon libere konatiĝi kaj komunikiĝi sur neŭtrala fundamento, kaj nur tiam povos malaperi tiuj bestaĵoj, kiujn ni nun vidas en diversaj lokoj«. — Do simpla reci-

proka konatiĝo de nacioj malgrandigos la malamikecon inter ili. Kaj ĉar internacia lingvo estas granda helpilo de tia interkonatiĝo ĝi havas tial signifon tuthomaran precipe pro tiu povo! Jen la konscio, kiu estis la plej ĉefa ideo entuziasmiganta Zamenhof'on kaj aliajn batalantojn de la unua horo. Sed jam antaŭ la unua kongreso aŭdiĝis voĉoj dirantaj: »Neligu kun esperanto iajn ideojn sociologiajn, moralajn, etikajn, naciajn aŭ internaciajn. Esperanto estas simple kaj ekzkluzive lingvo kun praktika celo, kun kiu oni ne devas kunigi iajn universalajn ideojn, kiujn oni eĉ ne elpensis«. Inter la tiel opiniantoj la plej sprita estis s-ro Louis de Beaufront, eldonanto kaj redaktoro de »L'Espérantiste«, eminenta stilisto, talentplena ĵurnalisto. Li kaj liaj riĉaj amikoj pensis kaj pensas ĝis nun, ke ĉiu montro, ke lingvo internacia alproksimigas humanecajn idealojn de universala frateco kaj de universala progresemo malutilas la propagandon de la lingvo internacia; ili eĉ proklamis kaj proklamas, ke en esperanto ne povas esti ia edifanta momento sociologia, kiel ĝi ankaŭ ne estas trovebla ekz. en gramatiko de ia alia lingvo aŭ en instrukcioj poŝtaj kaj telegrafaj.

S-ro de Beaufront kaj liaj partianoj ne estis, ne estas kaj ne estos pravaj. Historio, tiu grava rakontanto pri la pasinto, instruanto pri la praktika vivo, korektanto de la teorioj, juĝanto pri la celoj kaj faroj, pruvas, ke ili eraras. Evolucio de civilizacio dokumentas, ke ĉiuj aranĝoj, kiuj proksimigis la korpojn kaj cerbojn de individuoj, proksimigis ankaŭ homajn sociojn, gentojn, naciojn. La primitivaj nacioj pensas, ke koncerne membrojn de fremda nacio ekzistas neniu rajto kaj devo, kaj ke ili havas rajton eĉ ekzemple formanĝi la fremdnacianojn. Per grandiĝanta civilizacio la proksimaj nacioj unuiĝas, grandiĝas, rajton ricevas ĉiam pli multaj individuoj. La rapida progreso de la nova epoko rapidigis tiun procedon kaj la dudeka jarcento vidas naskiĝantajn internaciajn rajtojn. En organizacion de la homaro eniĝis sistemo de fervojoj, vaporŝipoj, telegrafo, telefono, fotografio, fototipio, ĵurnalaro, internacia poŝto. Tiuj aranĝoj pure teknikaj efektivigitaj per mirakloj de la aplikita scienco — kaj ekzkluzive ili, neniaj aliaj faktoj aŭ ideoj — kondiĉis, kaŭzis, efektivigis grandegajn ŝanĝojn sociajn. Ankoraŭ antaŭ 500 jaroj distingiĝadis nacioj ekstere per lingvo, vesto, kutimoj, etiketo. La mallongigo de interspacoj forigis ĉiujn tiujn eksterajn signojn de nacia diverseco krom la lingvo. La homaro daŭre ekfariĝas pli kaj pli homogena tuto, kies partoj devas kunlabori ĉiam pli kaj pli unuanime. Plej bone

dokumentas tiun tendencon la sentata bezono de internacia legislativo. Internacia juro jam ne estas senenhava parolo. Ne sole, ke ekzemple »naturaj rajtoj de civitano« estas en ĉiuj konstitucioj simile redaktitaj, sed estas ja jam kreitaj efektivaj leĝoj interŝtataj ekonomiaj (ekz. konvencio de Madrid el la jaro 1902) kaj sociale politikaj (ekz. malpermeso de flava fosforo por alumetfabrikado). Ĉiuj ĉi universalaj humanecaj aranĝoj estas direkta sekvo de teknikaj progresoj. Historio korektis naivecon de vilaĝanoj, kiuj pensis, ke fervojo estas diabla aparato tiel same, kiel timon de pesimistoj timantaj, ke fervojo estos instigilo kaj grandigilo de militoj. La progreso de kulturo estis en la nova epoko ĉiam plej intime kunigita kun progreso de la tekniko, ĉar sen la lasta la unua ne povus efektiviĝadi. (Daŭrigo.)

LA VIRINO KAJ AMO.

Enkonduko al la rakonto »*Marta*« de *Eliza Orzeszko*. El la pola lingvo tradukis *Dro L. L. Zamenhof.**)

La vivo de la virino estas eterne brulanta flamo de amo, diras unuj. La vivo de virino estas sinoferado, certigas aliaj. La vivo de virino estas patrineco, krias parto da homoj. La vivo de virino estas amuziĝado, ŝercas aliaj. La virto de virino estas blinda kredo, ĥore konsentas ĉiuj.

La virinoj kredas blinde; ili amas, sin oferas, edukas infanojn, amuziĝas... sekve ili plenumas ĉion, kion la mondo ordonas al ili plenumi, kaj tamen la mondo ial rigardas ilin senkonfide kaj de tempo al tempo ĝi esprimas sian opinion en formo de riproĉo aŭ averto: vi ne estas en ordo!

Inter la virinoj mem la pli akrevidaj, pli prudentaj aŭ pli malfeliĉaj, esplorante sin mem aŭ rigardante ĉirkaŭen, ripetas: ni ne estas en ordo!

Por ĉia malbono estas necesa ia helpa rimedo: tiuj kaj aliaj vidas ĝin en tio aŭ alia, sed la malsano ne cedas per helpo de la recepto.

Antaŭ nelonge unu el la verkistoj plej merite estimata en nia lando (Sro Zachariasiewicz en la novelo sub la titolo »Albina«) anoncis publike, ke la virinoj malsanas fizike kaj morale kaŭze de tio, ke al ili mankas granda amo (komprenեble koncerne la viron).

Ho, ĉielo! kia grandega maljusteco tio estas!

---

*) Vidu: »Bohema esperantisto«, jk. IV. kj. 7-8, pĝ. 121.

La rozokolora dio Eroso helpe flugu al mi malsupren kaj atestu, ke nia tuta vivo estas nonio alia ol konstanta incensado pro lia honoro.

Apenaŭ ni komencis marŝi per niaj propraj infanaj piedoj, ni jam aŭdas, ke nia destino estos ami iun el la sinjoroj de la kreitaĵaro: estante ankoraŭ knabitenoj, ni pri tiu sinjoro kaj reganto revas ĉiun vesperon, kiam en la ĉielo la luno lumas aŭ la steloj brilas, ĉiun matenon, kiam la neĝoblankaj lilioj malfermas al la suno siajn bonodorajn kaliketojn, ni revas kaj sopiras. Ni sopiras ĝis tiu momento, kiam estos al ni permesite, kiel lilioj al la suno turniĝi al tiu, kiu el la nebulo de la matenaj nuboj aŭ el la maro de la luna lumo elnaĝas antaŭ nia imago en la formo de Adoniso, dormanta sur ia mistero... Poste... kio do estas poste? La Adoniso malsupreniras el la nuboj, enkorpiĝas, ni interŝanĝas kun li ringojn kaj ni edziniĝas... Tio estas ankaŭ akto de amo, kaj kvankam la suprecitita verkisto, en siaj cetere tre belaj rakontoj, volas kredigi, ke ĉiam kaj senescepte tio estas nur akto de prikalkulo, mi ne konsentas kun li en tio. Ĝi estas akto de prikalkulo en esceptaj aferoj kaj cirkonstancoj, sed ĝenerale ĝi estas akto de amo. De kia amo? Tio estas jam tute alia afero, tre subtila kaj postulanta longan priparoladon; sed en ĉiu okazo, kiam en blanka muslino, kovrante la honteman vizaĝon per la tulaj randaĵoj, ni iras al la altaro, la ĉarma Eroso flugas antaŭ ni kaj balancas super nia kapo la torĉon kun rozokoloraj flametoj.

Poste? Kio do estas poste? Ni denove amas... se ne tiun el la sinjoroj de la krejtaĵaro, kiun la knabineto vidis en sia revado kaj kiun al la junulino metis sur la fingron la edzigan ringon — tiam alian; kaj cetere, se ni amas neniun, ni almenaŭ deziras ami... ni konsumiĝas, ni enfalas en ftizon, ni ofte fariĝas furioj kaŭze de nia dezirego de amo.

Kaj kio sekvas el ĉio ĉi tio? Unuj el ni, ŝirmitaj de la flugiloj de la dio de amo, traflugas la tutan vivon honeste, virte kaj feliĉe, sed aliaj, pli multaj, forte plimultaj, per sangantaj piedoj marŝas sur la tero, batalante pro la pano, pro trankvileco, pro virto, verŝante multe da larmoj, terure suferante kruele pekante, falante ĉiam pli kaj pli en la abismon de honto, mortante de malsato...

Sekve la recepto, konsistanta el la sola vorto »Amu«, helpas ne kontraŭ ĉiuj malsanoj!

Eble ni aldonu al ĝi ankoraŭ unu ingrediencon, por ke ĝi estu pli efika?

Kian?

— — — — — — — — — — — — — — — — — —

TAGO KAJ NOKTO.

El »*Arabesky*« (Arabeskoj 1864) de *Jan Neruda*. Boheman originalon esperantigis *H. K. Bouška*.

Ili sidis kune en la ĉielruĝo, la Tago kaj la Nokto.

La Tago diris: »Dudek kvar infanoj — tro granda benaĵo, tro multe! Kiel dividi ilin inter ni? Vi dek du, mi dek du, tio estus ebla ne ĉiam kaj ne longe; sed por longa tempo tio lacigus vin, malfortan virinon. Aŭskultu, edzino, tuj kiam venos la somero, mi mem prenos la plej grandan parton da ili sub mian zorgon. Mi jam ĝojas je ili, je tiuj etuloj! Mi ĝuigos al ili la sunon kaj la varmon, la florojn kaj la fruktojn, la ludojn kaj la gajon; sed poste mi ĵetos sur ilin la pluvegon, mi pelos ilin tra sovaĝaj ventoj kaj mi tremigos ilin per la tondro. Mi amas vidi, se la infanoj estas iom ekster la ordo, tio estas sana por ili.

La nokto ne respondis. Sed, kiam poste la suno komencis iradi sur la ĉielo en funebro, kiam al la patro Tago metis sin sur la brakojn kiel trenvestaĵo, kaj li, frostiĝinta, senkonscie estis perdanta unu infanon post la alia, tiam la patrino Nokto estis postiranta lin kaj kolektanta ilin. Kaj kiam venis la vintro kaj kune kun ĝi la longa mallumo kaj lacigantaj frostoj, ŝi jam havis la mantelon plenigitan de ili kaj ŝi estis kun ili de la vespero ĝis la mateno.

ÚČEL SJEZDŮ ESPERANTISTŮ.

Ze zahajovací řeči *Dra L. L. Zamenhofa* na sjezdu v roce 1907.

Poněvadž jsme se rozhodli, že budeme se scházeti každoročně ze všech zemí světa a mnozí z nás vykonávají i velmi značnou oběť, aby se mohli súčastniti našich sjezdů, musíme si vysvětliti, proč se scházíme. Jestliže si uvědomíme dobře podstatu a účel svých sjezdů, pak budeme přicházeti na ně s nadšením stále svěžím a nikdy neochabujícím, jako lidé, kteří jasně vidí před sebou krásný cíl, k němuž spějí; ale jestliže si neuvědomíme účel svých sjezdů, pak brzy úplně schladneme k nim, jako lidé, kteří bloudí bez cíle a jež toto bloudění brzy zna-

LA CELO DE L' ESPERANTISTAJ KONGRESOJ.

El la malferma parolo de *D-ro L. L. Zamenhof* dum la kongreso en la j. 1907

Ĉar ni decidis kunvenadi ĉiujare el ĉiuj landoj de la mondo kaj multaj el ni faras eĉ tre grandajn oferojn, por povi partopreni en niaj kongresoj, tial ni devas klarigi al ni, por kio ni kunvenas. Se ni konscios bone la esencon kaj celon de niaj kongresoj, tiam ni venados al ili kun ĉiam freŝa kaj neniam malfortiĝanta entuziasmo, kiel homoj, kiuj klare vidas antaŭ si la belan celon, al kiu ili iras; sed, se ni ne konscios la celon de niaj kongresoj, tiam ni baldaŭ tute malvarmiĝos por ili, kiel homoj, kiuj vagas sencele kaj kiujn

vuje a znudí. Proč tedy ss scházíme? Scházíme se, abychom mluvili o esperantských otázkách jazykových? Ne! tyto otázky nenáležejí sjezdu, ale výhradně jazykovému výboru, a na ně stačil by sjezd členů výboru. Scházíme se, abychom se cvičili v esperantském hovoru? Pro to jediné nemusíme jezditi na sjezd, poněvadž ve svých domácích spolcích můžeme za rok mnohem více se vycvičiti, nežli za několik sjezdových dní a pro pouhé několikadenní cvičení v řeči nikdo nepodnikne velikých cest. Scházíme se, abychom prováděli manifestaci a tudíž propagandu? Ano, zajisté! Ale, ježto ze sta účastníků sjezdu aspoň devadesátdevět má z esperanta jen morální zisk, proč tedy je propagujeme? Nepochybuji, že většina z vás dá nám jenom jednu odpověď: provádíme manifestaci a propagandu esperanta ne pro nějaký užitek, který každý z nás osobně může míti z něho, ale pro ten veledůležitý význam, který esperantism má pro veškeré lidstvo, pro ten všelidský cíl, který nás, činné esperantisty, přivábil k esperantu; scházíme se každoročně ze všech dílů světa, abychom měli potěšení, že vidíme samideány, abychom jim stiskli ruce, abychom rozohnili v sobě vzájemným setkáním a spolužitím lásku a nadšení pro myšlénku, kterou esperantism v sobě má. Jako staří Židé třikráte za rok scházeli se v Jerusalémě, aby povzbudili v sobě lásku k myšlence monotheismu (jednobožství), tak my scházíme se každoročně v hlavním městě Esperantie, abychom povzbudili v sobě lásku k myšlence esperantismu. A to je hlavní podstata a hlavní účel našich sjezdů.

Z esperanta přeložil *Hkb.*

tiu vagado baldaŭ lacigas kaj enuigas. Por kio do ni kunvenas? Ĉu ni kunvenas por paroli pri esperantaj lingvaj demandoj? Ne! Tiuj ĉi demandoj apartenas ne al la kongreso, sed ekskluzive al la Lingva komitato, kaj por ili sufiĉas kongreso de komitatanoj. Ĉu ni kunvenas por ekzerciĝi en esperanta parolado? Por tio sola ni ne bezonas veturi al kongreso, ĉar en niaj hejmaj grupoj ni povas en la daŭro de la tuta jaro multe pli ekzerciĝi ol en la kelkaj tagoj de la kongreso, kaj por la sola kelktaga ekzerciĝo en parolado neniu entreprenus grandajn vojaĝojn. Ĉu ni kunvenas por fari manifestacion kaj sekve propagandon? Jes, certe! Sed, ĉar el cent kongresanoj almenaŭ naŭdek-naŭ havas de esperanto sole moralan profiton, por kio do ni ĝin propagandas? Mi ne dubas, ke la plimulto el vi donos al ni sole unu respondon: ni faras manifestacion kaj propagandon por la esperantismo ne pro ia utilo, kiun ĉiu el ni persone povas havi de ĝi, sed pro tiu gravega signifo, kiun la esperantismo havas por la tuta homaro, pro tiu komune-homa celo, kiu nin aktivajn esperantistojn, altiris al esperanto; ni kunvenas ĉiujare el ĉiuj partoj de la mondo, por havi la ĝojon vidi samideanojn, por premi al ili la manon, por varmigi en ni per reciproka renkontiĝo kaj kunvivo la amon kaj entuziasmon por la ideo, kiun la esperantismo en si enhavas. Kiel antikvaj Hebreoj tri fojojn ĉiujare kunvenadis en Jeruzalemo, por vigligi en si la amon al la ideo monoteisma, tiel ni ĉiujare kunvenas en la ĉefurbo de Esperantujo, por vigligi en ni la amon al la ideo esperantisma. Kaj tio estas la ĉefa esenco kaj la ĉefa celo de niaj kongresoj.

RAPORTOJ KAJ NOTIZOJ.

Internacia ligo de virinoj celas moralan kaj spiritan perfektiĝon de virinoj, plinobligon de la familia vivo kaj protekton de ĉiuj interesoj de virinoj. Ĝi klopodas pri sinperfektiĝo, pri edukado kaj instruado de

l' infanoj, pri akiro de novaj profesioj por virinoj, pri atingo de egala salajro por egala laboro, pri protekto de patrineco, pri subpremo de prostituado, pri forigo de celibato, pri egalrajtigo de virinoj en familio, socio kaj ŝtato ktp. Ĝi esperas gajni la sukcesojn por la virinoj per firma organizaĵo regata de senco por altruismo kaj progreso. *Hkb.*

La vojo al vero (Resumaj konkludoj el la samnoma verko). Konscio ekzistas. Ĉio konsciata ekzistas. Nenia fenomeno aperas sen kaŭzo, nek restas sen efiko. La simileca grado de du fenomenoj estas proporcia al simileca grado de iliaj kaŭzoj. Ĉiu fenomeno povas sole unufoje kaj sole unumaniere okazi. La fenomenoj havas, en tempo kaj spaco, nek komencon nek finon. Ekster la fenomenoj nenio ekzistas en tempo kaj spaco. Subjektivaj kaj objektivaj fenomenoj estas en rilato kaŭzeca. La esteco de objektivaj fenomenoj ne estas sentile konebla. La perfekteco de vero estas proporcia al la simileca grado de fenomeno kaj la ideo pri ĝi. La simileca grado de du subjektoj estas proporcia al simileca grado de iliaj reagoj al sama objektiva fenomeno. Ĉiu fenomeno estas reago de iu subjekto. Ĉiu objekto en sia interna tuteco estas subjekto, kies rezistemo estas proporcia al kvanto de energio komunikita al ĝi. La dividebleco de objektoj estas senlima. La dinameroj kaj atomoj estas objektoj diferenciĝantaj de la sentile percepteblaj sole kvante. Ĉiu subjekto estas sidejo de sentoj. La esto de l' konscio estas absoluta. Konscio estas la absoluta esto, la interna realeco de ĉiu fenomeno. Universo estas senfina, eterna, sole ekzistanta Unuo. La evolucio de Universo estas absolute fatala, t. e. estonto estas tiel same neŝanĝebla kiel l' estinto. La evolucio estas senĉesa asociiĝado. La animo post morto de korpo, reobjektiviĝas konforme al emoj akiritaj en la antaŭa objektiviĝo. La malkomponiĝo de animo estas proporcia al disvolviĝo de spirito. Pura spirito ne reeniras materian korpon. Doloro estas disharmonio inter deziro kaj ebleco. La sola libereco estas la vero. Pura religio estas libera asocio de spiritoj kun komuna idealo. Puraj spiritoj kunfandiĝas en absolutan veron. Dio estas la idealo de Universa evolucio. La sola absoluta aŭtoritato estas la vero konsciata en si mem. *Stanislav Tomič.*

PROBLEMOJ KAJ OPINIOJ.

Bohema membro de „Esperantista akademio." En tiu ĉi jaro oni elektis du novajn akademianojn (sojn Inglada, Lengyel). Per tio la nombro da akademianoj atingis la ciferon 14 (sen do Zamenhof); inter ili estas 4 Francoj (Boirac, Cart, Moch, de Saussure), 2 Angloj (Ellis, Wackrill), 2 Hispanoj (Inglada, Villanueva), 2 Poloj (Bein, Grabowski) kaj po unu Germano (Mybs), Svedo (Nylén), Magiaro (Lengyel), Ruso (Evstifféieff). Kiel oni vidas, en »Esperantista akademio« estas malmulte da Slavoj (3 Slavoj, 11 neslavoj!) kaj neniu Bohemo; la fakto estas tiom pli stranga, ke oni elektas jam la membrojn el la nacioj, kiuj ne estas tiel signifaj por esperantista movado kiel Bohemoj (oni ne konjektu, ke ni envias al iu: ni sole konstatas la faktón). En la venonta tempo oni devas ankoraŭ elekti 4 membrojn, inter kiuj devas esti, laŭ la farita decido, iu Amerikano. Estas necese venonte zorgi, ke la slava elemento estu pli juste reprezentata en la akademio kaj ke estu respektata ankaŭ tiel grava elemento en esperantista movado kiel estas bohema esperantistaro. Tial ni deziras, ke oni elektu ankoraŭ minimume du slavajn akademianojn, inter kiuj estu almenaŭ unu bohema esperantisto (ankaŭ Rusoj meritus ankoraŭ unu lokon). Se oni rememoras, ke bohema esperantistaro, kiel per sia agemo tiel per

sia nombro estas grava parto da tutmonda esperantistaro, ke inter bohemaj esperantistoj estas multaj tre kompetentaj personoj kapablaj labori pri lingvaj problemoj, ni ne dubas, ke nia deziro estos plenumita. Ni ankaŭ ne hezitas rekomendi la personon plej taŭgan por tiu ĉi funkcio. Se oni elektos sole unu Bohemon, tiam oni povas elekti sole la prezidanton de bohem-esperantista lingva komitato s-on Čejka, instruiston el Bystřice-Hostýn (Moravio-Aŭstrio). Liaj bonaj lernolibroj pri esperanto (inter ili la unua detala lernolibro bohema), liaj vortaroj de esperanto (la solaj en la bohema lingvo), liaj artikoloj en esp. gazetoj, lia antaŭa redaktado de la revuoj »Revuo internacia« kaj »Bohema esperantisto«, lia nuna redaktado de bonega »Internacia pedagogia revuo« kaj lia kunlaborado en »Lingva komitato« k. t. p. (ni ne parolas pri aliaj meritoj, kiuj estas sen rilato al la lingva kapableco), montras sufiĉe klare, ke per la elekto de s-o Čejka la akademio gajnus tre kompetentan membron. Ĉu »Lingva komitato« rifuzos plenumi nian proponon? *H. K. Bouška.*

Kontraŭ mensogemajn esperantistojn — kies nombro estas bedaŭrinde grandega — la unua tutrusa kongreso de esperantistoj (Petersburg, 3.—8. V. 1910) voĉdone aprobis jenan, tre pravan proklamon: »La kongreso esprimas sian malaprobon al tiuj propagandmanieroj de esperanto, kiuj estas bazataj sur pligrandigitaj kaj malveraj sciigoj pri sukcesoj de esperanto«. La voĉdonintoj verŝajne estis legantaj la vicon de »oficialaj« raportoj de »Bohema unio esperantista« fabrikataj laŭ la fame konata »metodo de Kühnl«. Aŭ la »metodo de Kühnl« estas disvastigita ankaŭ en Rusujo? *Hkb.*

Kiu falsis „Tutmondan jarlibron esperantistan"? Sur alia loko (en la rubriko »Libroj kaj gazetoj«) ni montras, ke en »Jarlibro esperantista 1910«, redaktita de so de Ménil laŭ la dokumentoj de »Centra oficejo esperantista« (sekr. so Chavet), mankas informoj pri kelkaj societoj de bohemaj esperantistoj (strange, ke ĉiuj apartenas al »Bohema asocio esperantista« kaj ke mankas ankaŭ tiu ĉi grava asocio), kvankam la informoj pri tiuj ĉi societoj aperis en »Oficiala gazeto esperantista«, laŭ kiu »Tutmonda jarlibro« estas redaktita. Estas evidente, ke la informoj estis intence, tendence elstrekitaj, sekve, ke la jarlibro estis falsita. Tiu ĉi falsado en niaj dokumentoj estas terura, netolerebla fakto. Ni demandas: kiu faris ĝin, ĉu la redaktinto de l' adresaro, ĉu la sekretario de »Centra oficejo«? Sinjoroj Chavet kaj de Ménil parolu! *H. K. Bouška.*

INFORMACE A DOKUMENTY.

Spolky českých esperantistů mimo země české jsou — dle »Tutmonda jarlibro esp.« — jenom ve Vídni (Bohema klubo esperantista, BUE, Wien XVIII/1, Währingergürtel 61, Aŭstrio) a v Baltimore (Bohema klubo esperantista, EANA, Baltimore, N. Washington str. 900, Norda Ameriko). *Hkb.*

Postup esperantismu velmi názorně ukazuje tato tabulka, zaznamenávající počet esp. spolků, knih a časopisů od začátku vždy po pěti letech:

roku (31. pros.):	1889	1894	1899	1904	1909
počet spolků:	3	19	32	186	1447
» knih:	29	88	123	211	1372
» časopisů:	2	1	3	26	106

Hkb

KRONIKA A KOMENTÁŘ.

Esperanto na mezinárodním sjezdu Volné Myšlenky (Brusel, 21.-24. srp. 1910). Francouzští (na popud prof. Deshayse) a čeští (na popud prof. Fridricha) volní myslitelé esperantisté podali (za Francouze prof. Deshays, za Čechy Dr. Loskot) mezinárodnímu sjezdu V. M. návrh, aby přijat byl mezinárodní jazyk esperanto za oficielní pomocný jazyk při rozpravách na mezinárodních sjezdech V. M. a aby přijato bylo užívání esp. v dopisování stálé kanceláře mezinárodní federace V. M. a v její ročence. Návrh nebyl sice definitivně přijat, ale byl odkázán 5členné komisi, která má podati své dobrozdání příštímu sjezdu (Mnichov 1912), který pravděpodobně návrh přijme, neboť vedoucí a rozhodující činitelé jsou věci příznivi. Dlužno připomenouti, že delegát esp. sdružení V. M. (prof. Deshays) v zahajovacím sezení svůj proslov přednesl esperantsky (v něm zmínil se také o našem Ferrerovi) a že žurnály konstatovaly dobrý dojem a pochvalu, která byla vyvolána tímto esperantským vystoupením. Pozornost budila také schůzka volných myslitelů esperantistů (22. srp.), jíž zúčastnili se členové francouzští, belgičtí, němečtí, španělští, ruští a polští. *Bšk.*

Vyučování esperantu na školách. — V Plevně (Bulh.) je esp. nepovinným předmětem na gymnasiu. Podobně na několika jiných středních školách bulharských. — V Nagyváradu (Uhry) na gymnasiu premonstratského řádu přijal ředitel vyučování esp. do učebného plánu. — V Krakově (Halič) na obchodní akademii navštěvuje vyučování esp. 52 žaček. — Na škole »General Adrian« spolku obch. úřednictva obdrželo oficielní zavedení esperanta za předmět vyučovací schválení (rumunského) ministra veřejného vyučování. — V Rio de Janeiro (Brasilie) povolil šéf veřejného vyučování kursy esperanta na 10 t. zv. vzorných školách; vyučování účastní se asi 400 žáků. — Tamtéž je oficielně povolený (starostou) kurs esp. na známé vyšší škole pro učitelky »Pedagogium«, na národním gymnasiu (s pov. ministra vnitra) a na vojenské škole. *Nemo.*

Esperanto na cestách plně osvědčilo se při exkursi obchodní akademie v Brně. Účastníci byli v městech Bělehradu, Niši, Sofii, Vatky, Athenách, Patrasu přijati tamějšími esperantisty, kteří jim ochotně poskytli potřebné informace a provedli je městem. *V. Odložilík.*

Rozmanitosti z esperantského hnutí. — Dle čas. »Kijewskaja Misl« (1. dub. 1910) ruský ministr vyučování Švarc předloží dumě návrh na zavedení povinného vyučování esperantu na středních školách. — Se zvláštním svolením španělského ministra války ustavil se španělský svaz vojínů-esperantistů (Hispana asocio de militistoj-esperantistoj), jehož čestné předsednictví přijal sám král Alfons XIII. — Na sjezdech esperantistů belgických a brasilských byly oficielně zastoupeny vlády těchto států. — Při sjezdu esperantistů brasilských (Petropolis, 12.—13. V. 1910) byly z nařízení vlády přijímány kongresové telegramy bezplatně. — Populární pařížský denník »Le Petit Parisien« uveřejňuje (od počátku srpna) třikráte týdně krátkou kroniku v esperantu, jejíž franc. překlad přináší druhého dne. — Franc. spolek pro propagování esp. čítá 5 krajských federací, 108 spolků, 4927 členů! — Universita a spolek esperantistů v Grenoblu vydaly esperantsky leták o zvláštních kursech, konaných na této universitě (již od 14 let) pro cizí studenty, kteří chtějí se zdokonaliti ve francouzštině; kursů účastnívá se přes 1000 posluchačů, mezi nimi i esperantisté. Naši čtenáři studenti obdrží tohoto průvodce na požádání zdarma (adr.: S-o Roy, Grenoble, rue Anthoard 3, Francujo). — V Saské Kamenici (Chemnitz) 38 policistů podrobilo se zkoušce z esperanta, jíž přítomen byl sám pol. ředitel. — V Drážďanech fa Ernemannova (fotogr. přístroje) uspořádala zvláštní

kurs esp. pro úředníky. — Na rumunském ústavu slepců »Vatra Luminoasà« účastní se kursu esp. 35 slepců. — Obch. komora v Sabadellu (Špaň.) přijala esp. za jednací jazyk ve styku mezinárodním. — »Kaufmännische Blätter«, orgán velikého něm. svazu obchodního pomocnictva (čítá 35.000 členů) uveřejňuje kurs esp. (vede Fr. Stephan). *Kronikář.*

České přednášky o esperantu. V Bubenči v host. p. Ritticha uspořádala 1. X. 1910 »Občanská beseda« přednášku »O mezinárodním jazyce esperanto«; přednášel člen »Svazu čes. esp.« p. Dr. Frant. Palek. V Krči přednášel o esp. p. prof. Aug. Pitlík 14. VIII. 1910. V Kamenici n. L. v hotelu »u Lípy« přednášel o esper. (16. VII. 10.) pan Phst. Stanisl. Stejskal; po přednášce byl kurs. Ve Vyškově přednášel (22. a 27. VII. 10) »O důležitosti esp. pro lidstvo vůbec a pro národ český zvláště« pilný pracovník »Svazu čes. esp.« p. Fr. Klvač, předseda spolku esp. »Verda stelo« v Ivanovicích. *Kronikář.*

Kursy esperanta pro Čechy. Na Král. Vinohradech »Klub esp.« zahájil (23. IX. 10) v kavárně »Březinka« kurs esp. pro začátečníky (pát. 8—9), který byl četně navštěvován; vyučoval gen. sekretář »Svazu čes. esp.« p. Mil. Schmidt; klub koná nyní dva kursy: pro začátečníky (pát. 8—9) a pokročilé (pond. 8—9). V Kamenici n. L. konal se (od 21. VII. 10) v měšťanské škole bezplatný kurs esp. pro začátečníky, jehož se súčastnilo 30 osob; vyučoval p. PhSt. St. Stejskal (út., čtv. 6—7); po kursu ustaven kroužek esp., který se stal členem »Svazu čes. esp.«. V Brně »Klub čes. esp.« zahájil dne 4. X. 1910 kurs esp. na obch. škole p. prof. Pokorného (Rudolfská 1.); vyučuje se dvakráte týdně (út. a čtv. 7—8 več.) po 3 měs.; popl. 2 K; kurs oznámen velkými plakáty. Ve Vítkovicích v české obecné škole pořádá »Klub esp. z Ostravska« kurs esp. od počátku listopadu; vyučují střídavě pp. učitelé V. Bláha Fr. Talpa; popl. 2 K měs. Ve Vyškově konal se kurs esp. v Dělnickém domě (od 27. VII. 10), jejž obětavě vedl horlivý esperantista p. Fr. Klvač; kurs účinně byl propagován »Vyškovskými Novinami«. V Jihlavě pořádá tělocvičná jednota »Sokol« veřejný kurs esperanta, jejž vede p. JUC. Jos. Barvíř, adv. koncip.; kurs zahájen 29. X. 10 a odbývá se v sob. več. (6—7 hod.) v místnostech české školy měšťanské. *Kronikář.*

Výstavky českých esperantistů. V Kamenici n. L. při příležitosti místní řemeslnické výstavy uspořádána byla 14. VIII. 1910 malá, ale pěkná výstavka esperantských knih, časopisů, prospektů, pohlednic a pod., která značně povzbudila zájem o esperanto. Ve Vítkovicích v Českém domě »Klub esperantistů z Ostravska« pořádal ve dnech 18.—25. IX. 1910 (při příležitosti výstavy domácích potřeb pořádané »Národní jednotou pro sev.-vých. Moravu) výstavku esp. knih (značná část esp. literatury) časopisů (téměř všechny), dopisů a pohlednic (1500 z celého světa); výstavka navštívená asi 10.000 osobami, budila zasloužené uznání a obdiv; zejména pozornost budila sbírka p. uč. E. Esteraka (Mor. Ostrava), korrespondence s příslušníky 42 národů. *Kronikář.*

ZPRÁVY SPOLKOVÉ.

Zástupcem „S. č. e." v „Internacia konsilantaro" (Mezinárodní rada esperantistů) zvolen byl p. účetní rada Karel Biskup z Prahy.

První dámský český spolek esperantský měl valnou schůzi 2. VI. 1910. Z jednatelské zprávy dlužno uvésti: Spolek má 52 členy, pořádal během roku 4 bezplatné kursy esperantské četně navštívené, súčastnil se činně výstavky esperantské, pořádal zábavu s programem v esperantu

a přičiňoval se všemožně propagovati esperanto. Při volbě výboru zvoleny byly: za předsedkyni sl. Studničkova, za místopředsedkyni sl. Tesařova, za jednatelku pí Krausová (Adresa dopisů: pí Mat. Krausová, Praha I. 320).

Kroužek esperantistů v Kamenici n. L. (adresa: p. Vondráček, notář. úředník, Kamenice nad Lipou) přistoupil za člena »Svazu českých esperantistů«.

Klub esperantistů z Ostravska ve Vítkovicích vzdává vřelý dík výstavnímu výboru »Národní jednoty pro severovýchodní Moravu« za vzácnou ochotu, s jakou vyšel vstříc spolku při pořádání esp. výstavky.

Z mimosvazových spolků esperantistů. — *Klub esperantistů na Král. Vinohradech* koná své pravidelné členské schůze a konversační večírky vždy v pondělí večer (od 8 hod.) v kavárně »Březinka« (ul. Karlova a Táborská); na programu bývají přednesy a recitace v esp., které se těší velmi četné návštěvě. Členům je bezplatně k disposici objemná knihovna. (Člen. příspěvek je 3 K ročně.) Hosté jsou vítáni. Přihlášky členské i do kursů přijímá jednatel (Rud. Brotan, úředník, Král. Vinohrady, Hálkova 258/41).

Pro propagační fond „S. č. e." zaslali dále (III. výkaz): p. JUC. Jos. Barvíř, adv. koncip. v Jihlavě K 10·—, p. N. N., pošt. adj. v Bystřici p. H. K 10·—. Dík každému, kdo pamatuje na propagační fond!

LIBROJ KAJ GAZETOJ.

Komentario de Zamenhof al esperanta gramatiko *(Dro L. L. Zamenhof: Lingvaj respondoj).* En sia gramatiko de la lingvo internacia Dro Zamenhof donis 16 ĝeneralajn, »larĝajn« regulojn, kies preciza kaj detala apliko estis lasita al la praktiko kaj teoriaj esploroj de specialistoj. Nature kiel la plej kompetenta, ĉefa specialisto estis kaj estas ĉiam rigardata la aŭtoro mem de la lingvo, tial oni ofte petis de li diversajn klarigojn pri diversaj lingvaj demandoj devenantaj el la reciproka rilato de la lingvoj naturaj kaj la internacia. La vico da ĉi tiuj klarigoj (publikigitaj siatempe en »La Revuo«) estas kolektitaj en la libro »Lingvaj respondoj« kaj kreas komentarion, kiu klarigas multajn regulojn kaj ĝiajn aplikojn en esperanto. Ĉiu, kiu volas koni la opiniojn de d-ro Zamenhof pri diversaj lingvaj demandoj, devas studi tiun ĉi libron. Kaj kiu ne volus koni ilin? *Bšk.*

Populara verko pri la filozofio de la devo *(Ernest Naville-René de Saussure: La Devo).* En sia franca verko »Le Devoir« (1868) la eminenta francsvisia filozofo kaj politikisto, glora fondinto de »Association réformiste«, ŝatata membro de franca Instituto, granda favoranto de esperantismo (honora prezidanto de Svisia esperantista societo) prof. Jules Ernest Naville (1816—1909) prezentas la filozofion de la morala devo laŭ la plej alta kristana vidmaniero. Tre klare li traktas pri la deveno de l'ideo pri la devo, pri la konsisto, celo kaj praktikado de la devo. La verko — reproduktaĵo de la paroloj faritaj de Naville al virinoj de Génève (1867) kaj Lauzanne (1868) — estas verkita tre populare, tial ĝi estas facile komprenebla por ĉiu, kvankam ne ĉiu povas aprobe akcepti ĉiujn opiniojn de l'aŭtoro. La esperanta traduko, eldonita en tre eleganta libro sur naturpapero kun portreto de l'estiminda aŭtoro, estas bona kaj certe multe helpos por diskonigi la ideojn de Naville. (Kiam la loko permesos al ni, ni represos laŭ la permeso donita de la tradukinto fragmentojn el tiu ĉi verko). *Bšk.*

Internacia pedagogia revuo (I., 3.) La plej nova enhavoriĉa kajero de tiu ĉi bonega revuo reproduktas la malnovan artecan portreton

de J. A. Comenius. Inter la interesaj artikoloj estas: Kunedukado, Principoj de edukado de l'volo, La gepatroj kaj la edukado de la japana infanaro en la familio, La nordiaj instruistkongresoj, Tria internacia kongreso por la familia edukado de la infano. Sekvas artikoloj pri lernejaro en Japanujo, Rumanujo, Saksujo, Kroatujo verkitaj de diverslandaj specialistoj. »l. p. r.« firme plenumas sian belan programon kaj estas devo de esperantistaj instruistoj kaj profesoroj kiel eble plej forte subteni tiun ĉi revuon per abonado kaj kunlaborado. Ĝi tion vere meritas. *B.*

Lingvo internacia (XV., 8) publikigas kritikan raporton pri »Esperantista semajno en Bruxelles« (22.—26. VII. 1910). Juĝante laŭ tiu ĉi raporto la entrepreno ne estis sufiĉe bone preparita kaj ĝi ankaŭ ne havis atendatan sukceson ne plenuminte eblajn esperojn. En la sama n-o estas represita el »Čes. esp.« fragmento el la artikolo de s-o Otcovský »Sub esperantista standardo«. *B.*

Nova sento (II., 14.) en la notizo »Geografiaj nomoj« (V. O. de Allende) opinias, ke formante la geografiajn nomojn oni devas imiti kiel eble plej multe ilian nacian elparolon. La aŭtoro provu praktike sian konsilon kaj li vidos neakcepteblecon de sia propono. Li sendu ekzemple la leteron en urbon Keighley, skribante Kiĥli kaj li vidos, ĉu la letero venos al adresato. *B.*

Ricevitaj verkoj (la steleto* montras la verkojn, pri kiuj ni raportas aŭ raportos). — *La Devo.* Parolado adresita al la sinjorinoj ... de Ernest Naville ... Tradukita de René de Saussure ... Kun portreto de l' aŭtoro. Ĝenevo 1910. Librejo Kündig, Corraterie 11; pĝ. 152, prezo Sm 0·80 (*), — Stanislav Tomič: *La vojo al vero.* Originale verkita en esperanto. Paris 1910. Presa societo esperantista, rue Lacépède 33. Prezo Sm 0·40; pĝ. 36 (*). — Esperantista dokumentaro, Kajero dek-kvara (I, B, 7): *Pri la transskribo de la propraj nomoj.* Paris 1910. Esperantista centra oficejo, rue de Clichy 51. Prezo 1 fr; pĝ 91 (*). — Do L. L. Zamenhof: *Lingvaj respondoj* aperintaj en »La Revuo«. Paris 1910. Librairie Hachette et Cie, bvd. St. Germain 79. Prezo fr 0·75; pĝ. 30. (*) — *Proverbaro esperanta* laŭ la verko Frazeologio rusa-pola-franca-germana de M. F. Zamenhof aranĝis L. L. Zamenhof. Paris 1910. Librairie Hachette et Cie. Prezo fr 1·80; pĝ. 80. (*) 1910. *Tutmonda jarlibro esperantista.* Redakcio de F. de Ménil. Administracio Hachette et Cie. Paris 1910. Prezo fr. 3; pĝ. 280 (*) — Wilhelm Hauff: *La Karavano.* El germana lingvo tradukis J. W. Eggleton. Londono 1910. Brita esperantista asocio, 135 High Holborn, W. C. Prezo Sm 0·50; pĝ. 106 (*). — *Esperanto poŝtkalendaro por 1910.* Eldonita de red. Fritz Stephan. Leipzig. Esperanto-Verlag CWB. Naumburg, Johannisplatz 4/5. Prezo Sm 0·40; pĝ. 96. — *La evangelio laŭ Sankta Johano.* Tradukita el la originala Greko de prof. Wren J. Gristead, dr. D.O.S. Lowel kaj rev. R. P. Anderson. Londono 1910, Eldonita de Scripture Gift Mission, Strand 15; pĝ. 64, prezo Sm (?) (kun ilustraĵoj). — *Antverpeno kaj la Sepa universala kongreso de esperanto.* Eldonaĵo de »Anvers-Réclame« kaj la »Sepo por la Sepa«; pĝ. 32 (bela, ilustrita gvidlibro pri la urbo de la sepa kongreso esperantista). — *Gvidlibreto de »Le Creusot«* eldonita france kaj esperante. Le Creusot. Esperanto-oficejo, place Schneider 18. Prezo Sm 0·30; pĝ. 55 (franc-esperanta gvidlibro pri Le Creusot). — Jacques Camascasse: *Noto pri la Inicilo matematika* ... Paris 1910. Librejo Hachette et Cie. Prezo Sm 0·40; pĝ 31 (broŝureto klariganta la uzmanieron de »Inicilo matematika« — vidu »B. e.« IV, 11, 175 — kun 16 desegnaĵoj en la teksto kaj 16 desegnaĵoj sur la aldonita folio). — *Esperantista murkalendaro 1911.* Eldonejo »Espero« Hago Nederlando; prezo Sm 0·60 (folieta, forŝirebla kalendaro.

enhavanta la Julianan kaj Gregorianan datarojn, rememorojn, proverbojn, devizojn, spritaĵojn ktp.). — Zygmunt Romanski: *Pasho al perfektigo de esperanto.* Lwów 1910. Drukarnia Udzialowa, Kopernika 20. Prezo K 1·—; pĝ. 63. Ricevebla ĉe l'aŭtoro en Dublany. Lwów, Galicio (*). — *La logika bazo de vortfarado en esperanto.* De Antido. Propono al la Akademio esperantista . . Génève 1910. Universala esperantia librejo, rue de la Bourse 10; pĝ. 12, prezo Sm. (?) (*). — *La construction logique des mots en espéranto.* Répons à des critiques suivie de propositions à l'Akademie espérantiste par Antido. Génève 1910. Universala esperantia librejo. Prezo Sm 0·65; pĝ. 84 (*). — Gustave Gautherot: *La Quéstion de la Langue auxiliaire internationale.* Préface du vice-admiral Bayle. Paris 1910. Librairie Hachette et Cie. Prezo fr. 3·50; pĝ. 318 (*). — *Esperanto snadno a důkladně ve 20 hodinách,* pro mládež a kursy. Příloha časopisu »Zahrada domácí a školní«. Řídí zkušební komise spolku J. A. Komenský en Chrudim. Chrudim 1910. Zahrada dom. a škol. Prezo K 1.20 (*). — *Esperantská konversace v 1000 větách.* Sestavil F. Štěpánek. Karlín 1910. M. Knapp. Prezo Sm. 0·62; pĝ. 119 (*). — *Dictionnaire complet espéranto-français.* Par E. Grosjean-Maupin. Paris 1910. Librairie Hachette et Cie. Prezo 2 fr.; pĝ. XXVIII + 255 (*). — *Petit cours primaire d'espéranto en 50 leçons graduées* par MM. D. Bonnehon. A. Rosiaux. Paris 1910. Librairie Hachette et Cie. Prezo fr. 1·20; pĝ. 128 (*). — *Ausführliche Gramatik der Esperanto-Sprache.* Lehr- und Uebungsbuch für fortgeschrittene Esperantisten. Bearbeitet von Rektor Wilhelm Velten. Berlin 1910. Esperanto-Verlag Möller & Borel, SW. 68; pĝ. 230, prezo Sm, 0·90 (*). — *Gvidfolio tra Prostějov.* Eldonita de la tiea Esp. klubo sub la aŭspicioj de UEA. — *Gvidfolio tra Grenoble.* Eldonita de la tiea Esp. grupo sub la aŭspicioj de UEA. — *Universitata gvidfolio de Grenoble* (vidu en »Kronika a komentář«). — *Demonstraciaj tabeloj pri la konstruo de la lingvo esperanto.* Kunmetis Ph. Dr. A. Möbusz. Eld. Esperanto-Verlag Möller & Borel, Berlin SW. 68, Lindenstr. 18-19. 8 tabeloj 80×106 cm.). Prezo Sm. 2·50 (*). — *Program des IV. Internationalen Wirtschaftskurses in Wien* (vidu »Kronika a komentář«). — *1. kongreso de Universala esperanto-asocio* (provizora programo de la kongreso). — *Sing Me To Sleep.* Words by Glifton Bingham. Music by Edwin Greene. London. Phillips & Page, 8 Oxford Market, W. (muzikaĵo kun la teksto tradukita esperanten de G. L. Browne). — *Esperanto-oficejo en Lyon.* — *Adjuvilo,* Langue internationale pratique. Paris. Librairie Gamber, rue Danton 7. — Про мижнародну мову есперанто. Граматика і словарець на однім аркушу. (Rutena eldono de »Esperanto sur unu folio«; la unua rutena eldonaĵo pri esp.). — *Délégation pour l'adoption d'une langue auxiliaire internationale:* Protestation. *Rd.*

Ricevitaj gazetoj. — *Oficiala gazeto esperantista* (III, 4): kongresaj protokoloj. — *Esperanto* (VI, 86, 87): Aviado kaj esperantismo. Internacia higiena ekspozio 1911. Kongreso de paco en Stockholm. — *La Simbolo* (II, 7, 8): Ĉeĥaj proverboj (Dr. Volkmann). Malfeliĉulo (Dr. Lidovec). — *Nova sento* (II, 16). — *Libera penso* (10—11, 12): En Bruselo. — *Int. socia revuo* (IV, 10): kongresoj en Kopenhagen. — *Voĉo de kuracistoj* (III, 10); Pri R. Koch (Mieĉnikov). — *Informaj raportoj* (IV, 10). — *La Barbiro* (II, 3). — *Juna esperantisto* (VIII, 9). — *Germana esperantisto* (VII, 10). Mut zur Kritik. — *Germana Esperanto gazeto* (III, 18). — *Le Monde espérantiste* (III, 10): Reformo de l' kalendaro. — *Eĥo esperantista* (V, 51, 52). — *La Holanda pioniro* (III, 1,); La forto de la lingvo. — *La Ondo de esperanto* (II, 10). — *Kataluna esperantisto* (I), 6—7): Originalaj temoj *Normanda stelo* (III, 10). — *Antaŭen esperantoj!!* (VII, 5): Konstantoj aritmetikaj. — *Meksika stelo* (II, 20). — *Filipina esperantisto* (I, 3). *Rd.*

Zodpovědný redaktor H. K. Bouška. — Nakladatel Jan Iglauer. — Tisk »Politiky« v Praze.

BOHEMA ESPERANTISTO

ČESKÝ ESPERANTISTA

MĚSÍČNÍK PRO ŠÍŘENÍ ESPERANTA MEZI ČECHY.

ORGÁN „SVAZU ČESKÝCH ESPERANTISTŮ“ V RAKOUSKU.

ZODPOVĚDNY REDAKTOR:

H. K. BOUŠKA.

ROČNÍK IV.
(ŘÍJEN 1909—ZÁŘÍ 1910.)

PRAHA 1910.
NÁKLADEM JANA IGLAUERA V PRAZE. — TISKEM »POLITIKY« V PRAZE.

PŘEHLED OBSAHU
TABELO DE L' ENHAVO

ČLÁNKY ČESKÉ.

ARTIKOLOJ ESPERANTAJ.

RAPORTOJ KAJ NOTIZOJ.

INFORMACE A DOKUMENTY.

KRONIKA A KOMENTÁŘ.

ZPRÁVY SPOLKOVÉ.

LIBROJ KAJ GAZETOJ.

RŮZNÁ SDĚLENI.

DIVERSAJ KOMUNIKOJ.

AL LA LEGANTOJ.

Ni prezentas al la legantoj la kvaran jarkolekton de la unua bohem-esperanta revuo »Bohema esperantisto« (Český esperantista) — la duan jarkolekton sub nia redakcio.

Kiel en la antaŭa, tiel ankaŭ en la nuna jarkolekto de tiu ĉi propaganda revuo ni zorge klopodis vastigi (en la bohema parto de la revuo) la konojn kaj sciojn pri lingvo internacia ĝenerale kaj pri esperanto speciale kaj la posedon de la lingvo de Zamenhof, ni klopodis veki kaj subteni (en la esperanta parto) la sencon kaj komprenon por la modernaj problemoj kaj ideoj internaciaj, humanecaj kaj progresemaj, la senton por la vero, bono kaj belo, la konojn pri la bezonoj kaj aranĝoj de l'internacia vivo kaj sciojn pri rimarkindaj aktualaĵoj.

Estas vere, ke ni ne atingis ĉion, kion ni deziris, sed tio ĉi estas afero tute natura kaj komprenebla: nia programo estas tre ampleksa kaj diversflanka — nia revuo estas negranda kaj batalanta kontraŭ multaj malfacilaĵoj. Tamen ni povas fiere konstati — sen ombro de malmodesteco —, ke ni laboris kun la amo, bona volo kaj plena kompreno por la afero, ke ni faris ĉion, kion ni povis fari en la nunaj, tre malfacilaj cirkonstancoj, kaj la homo bonvola kaj sperta en la vivo ne povas preterrigardi, ke ni sukcesplene penis, ke la nivelo de nia revuo estu kiel eble plej alta, ke nia revuo per siaj enhavo kaj ekstera aranĝo inde reprezentu la boheman esperantistaron kiel fremdlande tiel hejme. Rigardu la tutan jarkolekton! Sur malmultaj negrandaj paĝoj ni donis valorajn kaj seriozajn verkaĵojn, kiujn certe multa leganto ofte relegos: ni kolektis interesajn bohemajn artikolojn pri la problemo de lingvo internacia kaj pri ĝia solvo, belajn esperantajn artikolojn pri rimarkindaj problemoj kaj okazaĵoj aktualaj kaj internaciaj, bonajn tradukojn de rakontoj de diversnaciaj verkistoj, koncizajn kritike elektitajn kaj revue ordigitajn bohemajn raportojn pri nia movado en fremdlandaro, detalajn kaj fidindajn sciigojn pri la stato de esperantismo en niaj landoj, multajn kaj precizajn informojn pri

l' organizo kaj historio de esperantismo, pri l' esperantaj literaturo kaj gazetaro ktp., sekve ankaŭ tiu ĉi jarkolekto, kiel ĉiuj antaŭaj, donas riĉan materialon al nuntempaj propagandantoj kaj venontaj historiografoj de nia movado. Cetere ni promesas, ke ni faros en la venontaj jaroj, kion ni ne faris ĝis nun. Niaj amikoj scias, ke ili povas fidi al ni.

Kun plezuro ni konstatas, ke la rondo de niaj kunlaborantoj konsistas el multaj eminentaj esperantistoj bohemaj kaj fremdlandaj, kaj ke ni sukcesis gajni por kunlabori multajn novajn kapablajn kaj spertajn esperanto-verkistojn, kies artikoloj aperos en la venonta jarkolekto. Tiu ĉi kunlaboro estas por ni agrabla garantio, ke ni sukcesos en nia penado malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj kaj malhelpaĵoj, kontraŭ kiuj ni devas batali.

Ni faras agrablan devon esprimante nian sinceran dankon al ĉiuj, kiuj kiel ajn helpis aŭ helpos al ni, al niaj oferemaj kunlaborantoj, diligentaj korespondantoj, fidelaj abonantoj, kaj ni ĝoje esperas, ke ĉiuj nunaj amikoj de nia revuo kaj de nia asocio konservos plu sian favoron por ni kaj ke ili klopodos, ke la rondo de niaj amikoj kiel eble plej multe pligrandiĝu. Ju pli multe oni helpos al ni, des pli multe ankaŭ ni povos fari.

La redakcio.

Redaktoro: H. K. Bouška, Praha-Smíchov 1097. — Eldonanto: Jan Iglauer, Praha III, 495. — Presejo: »Politika«, Praha. — Bohemujo-Aŭstrio.